

Justinus Kerner,

## La soleculo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Iradas vi ĉe ama man',  
Feliĉa estas vi.  
Sed kio feliĉigas min  
Ĝi iras ja kun mi.

Ĝi estas de l' ĉielo blu',  
Herbeja la florar',  
De l' najtingala dolĉe kant'  
En nokta la arbar'.

De l' nuboj kuro estas ĝi,  
De ' verda gren' ondanta mar',  
De la vivantaj akvoj flu',  
La flugo de birdar'.

Vi kuŝas en virina brak',  
ĉe buŝo de odor',  
Solece iras tra l' aer'  
Mi de l' vespera hor'.

Migrant' ne venas, la birdar'  
Ripozas ĉie ĉi,  
Mi iras tra l' malhela nokt'  
Kun hela song' en mi.

...

Traduko de la Germana poemo "Der Einsame" de JUSTINUS KERNER (\*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2014-10-27.

Arg-1094-2205 (2014-10-27 13:34:26)